

La Riverego kebekia esperantista bulteno

Oktobero 2003

Esperanto-Societo Kebekia

Jaro 17

Kio pri 2002-2003?

Raporto de la prezidanto de ESK pri la agadoj en 2002-2003.

Normand Fleury

Ni nun troviĝas en transira periodo ne nur en la provinca movado sed ankaŭ en la landa kaj en la internacia. La mondo sanĝiĝas, teknike moderniĝas rapide por parto de la homaro sed tamen, dume, duono de la homaro ne uzis ankoraŭ telefonon. Videblas la intereso pri Esperanto pli kaj pli ĝuste en la tiel nomata *tria mondo*, kiu ne posedas la rimedojn por uzi la lingvon. Dume, la pli riĉa mondo ignoras nian potencialon.

Sed mi revenu al kio okazis en Kebekio. Mi devas diri ke ni ne konkrete progresis, malgraŭ ke la estraro kaj kelkaj helpantoj pli aktive agis. Ja en 2002 estis nia 20^a jariĝo kaj ni havis plurajn projektojn. Pri la radio-elsendoj ĉe Radio Canada International, nenio rezultiĝis, ĉar ĉiuj ministerioj kiuj respondis kvazaŭ diris, ke ili ne respondecas pri tio. Ni konkludis, ke neniu volas respondi pri la decido malakcepti (aŭ akcepti) Esperanton.

Pri la uzo de Esperanto pere de *Postes Canada* fare de Avo Frosto, la decido estis pozitiva kaj ni esperas plu sukcesi en la venontaj jaroj. Sed

tio parte dependas de la reago de la infanoj tra la mondo. Fine, pri la nomigo de Esperanto-strato en Montrealo, nenio okazis ĉar daŭre, la nova urbo frontas malstabilecon. Ni sekvas la aferon. Tamen, ni aŭdis, ke en Gatineau (Hull, Aylmer) ili jam sanĝis plurajn stratnomojn pro la kunigo. Estas do eblecoj. Helpe de Jérôme-Frédéric Bouchard, ni modernigis nian aspekton. Same ĉe la reto: dank'al Jessy LaPointe, ni daŭre pli beligas kaj pli ampleksigas nian retejon.

*Estis tre
kvalitaj
artikoloj kun
fotografioj kaj multaj
homoj vizitis
nian retejon
post tiuj
publikigoj.*

La ĉefaj atingoj je informado estis artikoloj en *Le Devoir* somere 2002 kaj en *La Presse* somere 2003. Ili ambaŭ estis tre kvalitaj artikoloj kun fotoj kaj multaj homoj vizitis nian retejon post tiuj publikigoj.

Ni organizis la 1^{an} Mez-Kanadan renkontiĝon en Otavo, la 3^{an} Biciklistan Semajnon en Montrealo kaj la 9^{an} Internacian Semajnfino en Vermonto. Ni ja devas rekonsideri ilin, ĉar ja organizi tri grandajn eventojn jare estas multe da laboro.

Estis elektita nova estraro, kiun mi denove estros kaj me ja estas entuziasma daŭrigi la agadon kaj dankas tiujn, kiuj sendis apogon al ni. Tio certe helpis.

Kalendaro, oktobro-marto

La kunvenoj en Montrealo okazas la lastan vendredon de la monato je la 19:30 ĉe la Montreala Esperanto-domo (MEDO), 6358, rue de Bordeaux, Montrealo. Metroo Beaubien, Buso 18 orienten aŭ Metroo Fabre kaj Buso Papineau suden.

-10^a Internacia Semajnfino Esperantista en Okemo, Ludlow, Vermonto (11^{an}-13^{an} de oktobro). *Vidu nian retejon por la detaloj. Venu sperti Esperantion en internacia etoso.*

-31^{an} de oktobro ĉe MEDO
-28^{an} de novembro ĉe MEDO

-13^{an} de decembro
Zamenhofa festo, kunportu pladon por la komuna bufedo je la 18:00. Ĉe MEDO

-30^{an} de januaro ĉe MEDO

-27^{an} de februaro ĉe MEDO

-21^{an}-27^{an} de marto 2004, 6^a
Tutamerika Kongreso de Esperanto. *Temo : Kia Esperanto-movado por Ameriko?*

kubesp@ip.etc.ca

Kelkaj vizitindaj retejoj

Martin Benoît

En la reto ekzistas pluraj bundaj TTT-pagxoj pri Esperanto kiuj indas viziti. Ĉi-sube estas kvar el la plej popularaj kaj konatindaj.

Realiĝu frue! Réabonnez-vous vite!

Sylvain Auclair

La estraro de ESK tre ŝatus, ke la membroj sendu sian realiĝilon (kun la pago, kompreneble...) tuj post la ricevo.

Tio estas des pli grava se oni samtempe reabonas al *Le Monde de l'Espéranto*. Ĉar ni devas mendi la ĝustan nombron da ekzempleroj, malfrua reabono povus kaŭzi tion, ke vi maltrafos unu numeron.

Les administrateurs de la Société apprécieraient beaucoup que les membres renvoient leur formulaire de réadhésion (avec le chèque, bien entendu...) dès qu'ils le reçoivent. Cela est d'autant plus important si, par la même occasion, on se réabonne au *Monde de l'Espéranto*. Comme nous devons commander le nombre exact d'exemplaires, un réabonnement trop tardif pourrait nous empêcher de vous faire parvenir tous les numéros correctement.

www.gxangalo.com

“Gxangalo” estas portalo kiu enhavas plene je servoj. La ĉefa estas la reĵurnalo, kiu aŝiŝas la novaĵoj el ĉie en la mondo. Ĝi pritraktas mondan politikon, ĉefajn okazaĵojn, kaj kompreneble Esperanton. Krom tio, Gxangalo aldonis forumon por ke la membroj povu interkomuniki, retbiblejon, ludojn, kaj aliajn, kiujn vi povas mem malkovri.

eo.wikipedia.org

Vikipedio (“Wikipedia” angle) estas komuna projekto kiu konstruas enciklopedion retalireblan. Ĝiaj membroj redaktas la artikolojn pri bundaj temoj. Vikipedio estas multlingva kaj enhavas plejparte de la grandaj lingvoj, inkluzive de Esperanto. Granda valoro de Vikipedio estas, ke ĉiuj povas kontribui al la projekto, do ĉiuj povas redakti

artikoleton por ke poste iuj plibonigu ĝin, ĝis profesia enhavo. La projekto havas 44 lingvojn, kaj la Esperanta versio enhavas 8600 artikolojn. Do: redaktu!

www.lernu.net

“Lernu!” estas projekto el *Esperanto Ĉe Interreto* de TEJO. Ĝi estas interaga reta ilo por lerni Esperanton, alirebla per 19 lingvoj. Ĝi prezentas enkondukon pri la lingvo, plurajn retkursojn perlecione, ekzercojn, kaj gramatikon. Estas pluraj utilaj iloj, kiel la vortaro, la alklিকেblaj vortoj, la vortlernadilo, ktp. Ankaŭ estas tujmesaĝilo kaj ludoj por distri sin. Definitive ĝi estas ideala unua paŝo por lernantoj de Esperanto kiuj pretas akiri la lingvon per si mem.

www.google.com/intl/eo/

Serĉilo por trovi informojn en Esperanto.

Ĉu ankoraŭ taŭgas papera *Riverego*? Une version imprimée de *La Riverego* est-elle encore de mise?

Fine de aŭgusto, ESK decidis rememorigi la okazon de la ĝenerala kunsido per sendado de retletero, al tiuj membroj, kiuj estis sciigintaj al ni sian retadreson, kaj de paperpoŝta letero al la aliaj. (Se vi ricevis nenion, estas tial, ke via retadreso montriĝis ne ĝusta). Evidentiĝis, ke malpli ol 20 membroj ne havas retadreson konatan de ni. Oni eĉ povus demandi sin, kial sendi al ĉiuj paperan ekzempleron de *La Riverego*. Kion la membroj pensas pri tio?

Fin aŭt, la SQE decidait de rappeler à ses membres la tenue de l'assemblée générale, soit par courriel à ceux de nos membres qui nous avaient donné leur adresse électronique, soit par poste ordinaire pour les autres. (Si vous n'avez rien reçu, c'est parce que nous avons une adresse courriel invalide.) Il s'avère que moins de 20 de nos membres n'ont pas d'adresse électronique. C'est à se demander s'il vaut encore la peine d'imprimer une version papier de *La Riverego* pour tous les membres. Qu'en pensez-vous?

Sylvain Auclair

La angla: lingvo por frenezuloj?

Ŝerca teksto

Suzanne Bolduc

We'll begin with a box, and the plural is boxes;
But the plural of ox became oxen not oxes.

One fowl is a goose, but two are called geese,

Yet the plural of moose should never be meese.

You may find a lone mouse or a nest full of mice;

Yet the plural of house is houses, not hicc.

If the plural of man is always called men,

Why shouldn't the plural of pan be called pen?

If I spoke of my foot and show you my feet,

And I give you a boot, would a pair be called beet?

If one is a tooth and a whole set are teeth,

Why shouldn't the plural of booth be called beeth?

Then one may be that, and three would be those,

Yet hat in the plural would never be hose,

And the plural of cat is cats, not cose.

We speak of a brother and also of brethren,

But though we say mother, we never say methren.

Some reasons to be grateful if you grew up speaking English:

1) The bandage was wound around the wound.

2) The farm was used to produce produce.

3) The dump was so full that it had to refuse more refuse.

4) We must polish the Polish furniture.

5) He could lead if he would get the lead out.

6) The soldier decided to desert his dessert in the desert.

7) Since there is no time like the present, he thought it was time to present the present.

8) At the Army base, a bass was painted on the head of a bass drum.

9) When shot at, the dove dove into the bushes.

10) I did not object to the object.

11) The insurance was invalid for the invalid.

12) There was a row among the oarsmen about how to row.

13) They were too close to the door to close it.

14) The buck does funny things when the does are present.

15) A seamstress and a sewer fell down into a sewer line.

16) To help with planting, the farmer taught his sow to sow.

17) The wind was too strong to wind the sail.

18) After a number of Novocain injections, my jaw got number.

19) Upon seeing the tear in the painting I shed a tear.

20) I had to subject the subject to a series of tests.

21) How can I intimate this to my most intimate friend?

22) I spent last evening evening out a pile of dirt.

Screwy pronunciations can mess up your mind! For example...If you have a rough cough, climbing can be tough when going through the bough on a tree!

Let's face it - English is a crazy language. There is no egg in eggplant nor ham in hamburger; neither apple nor pine in pineapple. English muffins weren't invented in England.

We take English for granted. But if we explore its paradoxes, we find that quicksand can work slowly, boxing rings are square and a guinea pig is neither from Guinea nor is it a pig.

And why is it that writers write but fingers don't fing, grocers don't groce and hammers don't ham?

Doesn't it seem crazy that you can make amends but not one amend?

If you have a bunch of odds and ends and get rid of all but one of them, what do you call it?

If teachers taught, why didn't preachers praught?

If a vegetarian eats vegetables, what does a humanitarian eat?

Sometimes I think all the folks who grew up speaking English should be committed to an asylum for the verbally insane.

In what language do people recite at a play and play at a recital? Ship by truck and send cargo by ship? Have noses that run and feet that smell? How can a slim chance and a fat chance be the same, while a wise man and a wiseguy are opposites?

You have to marvel at the unique lunacy of a language in which your house can burn up as it burns down, in which you fill in a form by filling it out and in which an alarm goes off by going on.

If Dad is Pop, how's come Mom isn't Mop?

La verdaj montoj de Esperantujo

Meze de la verdaj, rondaj montoj de la usona Ŝtato Vermonto, kelkaj hektaroj fariĝis malgranda provinco de Esperantujo. Nur dum tri semajnoj, bedaŭrinde, rapide forflugintaj.

Francisko Lorrain

Lastj Julie, la ĉiujara Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) akceptis dudek sep homojn el kvar kontinentoj kaj naŭ landoj. Inter ili estis Stevens Norvell, emerita ĥirurgo el Halifakso (kiu partoprenis en eble dek NASKoj), ĉina tradukisto kaj pentraĵamatoro Wen Jingen, veterana dana Esperantisto Preben Bagger, ties 16-jara nepino Elisabeth Johansen, usona mondfederaciisto Ronald Glossop, kaj la konata kroata verkisto kaj akademiano Spomenka Ŝtimec, kiu intruis la trian, plej altan, kurson.

Kulminoj de nia restado tie estis du vesperaj prelegoj. La unua de Aleksandr Ĥarĵkovskij el Novjorko pri la legenda rusa verkisto Eroŝenko, kiu, blinda, vojaĝis tra la tuta mondo kaj skribis ĉefe japane kaj Esperante. S^{ro} Ĥarĵkovskij estas specialisto pri tiu aŭtoro. La duan prelegon faris Humphrey Tonkin, vicprezidanto de UEA, pri la arto de tradukado - kun ekzemploj el diversaj tradukoj de Hamleto kaj Henriko la Kvina de

Ŝekspiro al Esperanto. Alian vigligan vesperon ni pasigis kun la energia Kimo Henriksen de la muzikgrupo *Esperanto Desperado*, ofte kunkantante.

La dudek tri studentoj estis apartigitaj en tri nivelojn. Ĉijare instruis la unuan nivelon, por progresantoj, Lee Miller el Usono (la ĉefinstruisto), kaj la duan nivelon, por progresintoj, Paŭlo Gubbins el Britujo (redaktoro de *La Brita Esperantisto* kaj kunredaktoro de *Monato*). Spomenka Ŝtimec, mi jam diris, respondecis pri la tria.

En la tria nivelo, la ĉefaj temoj estis la kulturo, literaturo kaj historio de Esperanto; la manlibro uzata estis la ege interesa, bele prezentita *Vojaĝo en Esperanto-lando* de Boris Kolker. En la dua nivelo, tiuj temoj konsistigis ankaŭ gravan parton de la kurso kaj la manlibro estis la sama. Ĉe ĉiuj niveloj, la instruado sekvis plejparte aktivan metodon, kiu multe paroligas la studentojn. Jen interesa apartaĵo de NASK: la unua kaj tria lecionoj estis matenaj, la dua posttagmeza, kaj la studentoj rajtis ĉeesti du nivelojn ĉiutage. Tion faris kelkaj.

Grava parto de la kursaro estas la NASKa Fasko, ĉiutaga bulteno, zorgita de Tim Westover. S^{ro} Westover estas usonano kaj studas la rusan literaturon en Moskvo. En tiu bulteno, studentoj kaj instruistoj

publikigas ĉiaspecajn tekstojn: eseojn, poemojn, rakontojn, ktp. Tio estas interesa rimedo por pli bone koni la aliajn kunNASKanojn, ĉar per verkado, oni foje rivelas sin pli intime ol per parolado. Parto de la enhavo troviĝas ĉe “<http://www.medialabinc.net/temp/fasko/nask2003/index.asp>”.

NASK okazis ĉiusemere en Usono dum tridek kvar sinsekvaj jaroj! Ekde du jaroj, ĝin akceptas la Lernejo por internacia trejnado (*School for International Training, SIT*) apud la ĉarma, tipe novanglia urbeto Brattleboro (Vermonto). SIT estas malgranda neordinara altlernejo, kies celo estas stimuli internacian interkompreniĝon pere de lingvoinstruado, kursoj pri daŭra disvolviĝo kaj organiza administrado, staĝoj en pluraj landoj, kaj diversaj paccelaj aktivadoj. Dum nia restado ĉiusemere, ekzemple, okazis ĉe SIT kelktaga seminario inter islamanoj kaj judoj, kaj poste komenciĝis plursemajna pacstaĝo de grekaj kaj turkaj gejunuloj el Kipro. Kia taŭga loko por studi Esperanton!

La supra artikolo estas iomete adaptita versio de artikolo, kiu aperis en la oktobra numero de la rusa revuo La Ondo de Esperanto.

La Riverego (Le Fleuve) est publiĉ par la Sociĉtĉ quĉbĉoise d'ĉsperanto six fois par annĉe. Dĉpĉts lĉgaux: Bibliothĉques nationales du Canada et du Quĉbec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilitĉ des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Photocopiĉ ĉ 90 exemplaires. Gratuit pour les membres de la Sociĉtĉ quĉbĉoise d'ĉsperanto. La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia sesfoje dum la jaro. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn,

kun nepra indoko de la fonto. Fotokopiita 90oble. Senpage por la membroj de la ESK. Por aliaj, la jara abono kostas 10 kanadajn dolarojn. UEA-doko de la Societo: kebk-d.

ĉchĉance pour le prochain numĉro/Limdato por la venonta eldono: 2003.12.15

jessylapointe@hotmail.com

Rĉdacteur en chef/ĉefredaktoris Jessy LaPointe. Administrateurs de la SQE/Estraranoj de ESK: Normand Fleury (prĉsident/prezidanto), Jĉrĉme-Frĉdĉric Bouchard (vice-prĉsident/vicprezidanto),

Sylvain Auclair (trĉsorier), Jessy LaPointe (secrĉtaire/sekretario) kaj Martin Benoit.

Esperanto-Societo Kebekia
Sociĉtĉ quĉbĉoise d'ĉsperanto
6358-A, rue de Bordeaux
Montrĉal (Quĉbec)
H2G 2R8

Telefonrespondilo kaj telekopiilo/Rĉpondeur et tĉlĉcopieur: (514) 272-0151
esperanto@sympatico.ca
<http://www3.sympatico.ca/esperanto>